

La Suda Kruc

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 22. Melburno (*Melbourne*), Australio.

10 Aprilo, 1922.

Teachers and Esperanto.

Victorian State School Teachers are having the claims of Esperanto to their attention kept prominently before them. An interesting series of addresses on the subject will be given at the Teachers' Training College on the 19th April. "The Program," (official organ of the Victorian State School Teachers' Union), in its April issue printed a two-column "open letter" to the members of the Teachers' Interstate Conference, Easter, 1922. This letter reviewed the advantages which would follow the universal adoption of Esperanto, its present progress, the results that have followed its instruction in certain schools, and the opinions of leading philologists. The last departmental "Education Gazette" published a letter from the modern languages master at the Teachers' College about Esperanto.

Examination.

An examination for the B.E.A. preliminary certificate will be held by the A.E.A. in Melbourne during the last week in May. Those intending to sit should notify the secretary before the 28th April.

Australian Natives' Association Recommends Members to Learn Esperanto.

This important association of native-born Australians has just concluded its annual conference. It considered a great many questions of national importance, and in view of the influence it has in moulding public opinion it is specially gratifying to Esperantists to note that one of the resolutions of the conference was a recommendation to all branches to establish Esperanto classes, and to the Board to assist in the furtherance of the study of the language.

The secretary of the Australian Esperanto Association has already communicated with the General Secretary of the A.N.A. with a view to putting this resolution into practical effect.

Nova U.E.A. Vic-Delegito en Melburno.

La Melburnaj membroj de la U.E.A. en sia lasta kunsido elektis sinjoron Roy R. Rawson kiel lokan vic-delegiton. Lia adreso estas 212 strato Swanston, Melburno.

Tagoj en Rabaul.

— Mastro! Mastro! — Urĝa duonvoĉo sonas ie proksime.

Malklare tra la duondormo kaj la dika moskiteltena reto, mi eksentas, ke la mateno venis. Ekstere, la suno forte kaj flave lumas sur la flave-verda herbo. Interne, la preskaŭnigra vizaĝo de mia juna domservisto aperas apud la lito, kaj tekolora miano prezentas tason da teo. Mi penseme trinkas la teon, kaj leviĝas por travivi alian tropikan tagon en Nov-Gineo.

Dum la duŝado mi de tempo al tempo ekvidas la "knabon," kiu diskrete sin banas malantaŭ la aparte-staranta kuirejo, kaj tamen li ne ĉiam sentas la bezonon demeti la lumbotukon, sed kontente lasas ĝin sekigi sur la korpo. Kaj dum la ceteraj ceremonioj de mia tualetto li diligente okupas sin en la kuirejo. La manĝotablo por la simpla matenmanĝo estas jam primetita; la fresaj vestoj por la tago jam kuŝas sur seĝo, la butonoj (kiujn mi neniam uzas) jam brilas en la jako, la blankaj ŝuoj jam staras apude; ĉio estas preta.

Restas nur prepari la teon. Granda tasko, evidente. Du-trifoĝe aperas ĉe fenestro de la kuirejo nigra kapo kun krono el nigrega, krispa hararo kaj brakoj dismetitaj sur la sojlo, kun demando, ĉu mi eble vestos hodiaŭ la nigrajn ŝuojn pro minacanta pluvo, aŭ ĉu li donu al la venanta Ĉina lavisto la uzitajn vestojn... kaj la demandoj estas farataj kun serioza, distrita mieno de dommastrino, kiu preparas dimanĉan tagmanĝon por granda familio. La kuirejo mem helpas al la iluzio de granda laboro: el la fenestroj, pordo kaj tegmentorando fluas senfine kvanto da fumo, kiu memorigas pri la apokrifita legendo de Karlo Lamb pri la Rimarkinda Eltrovo de la Rostita Porkaĵo, laŭ kiu la Ĉinoj kredis, ke estas bezone forbruligi tutan domon por rosti unu porkon. Kaj ĉio ĉi por prepari du tasojn da teo.

Mangante en plena aero sur la verando—en Nov-Gineo oni kiom eble vivas sur la vastaj verandoj de la "bangaloj"—mi foje levas la okulojn for de la libro kaj rigardas la senfinan movon ĉirkaŭ mi. Flave-

grizaj lacertoj, longaj nur du-tri colojn, kuras sur la planko, muroj kaj plafono, kaj ekhaltas por min rigardi per la komikaj, amikaj okuloj en la granda plata kapo. Pli grandaj lacertoj, duone verdaj, duone flavaj, kuras sur la trunkoj de la larĝaj arboj ombrantaj la domon. Unu-du moskitoj zumas ĉirkaŭ la tablo, aŭ tute sen zumo aŭ parolo aŭ alia averta ekspikas min. La ombroj de la altaj, delikataj, pinsimilaj casuarinarboj dancetas sur la herbo. Brunuloj iras tien kaj reen konstante: portante matenmanĝon en emajlita, multetaĝa pladaro aŭ proprajn trezorojn en simpla, malvasta korbo ligita al la ŝultro; ili estas vestitaj per lumbotukoj de diversa koloro kaj diversa pureco. Hele blanka, radiantia brilo montras pason de Eŭropano.

Mi jam parolis pri mia "knabo," la preskaŭnigra junulo el Buka (Bougainville), kiu faras miajn bezonojn. Fidela, laborema, skeptika, ŝercamanta, diligenta, kritikema, zorgema, gaja, pripensema, ironia Kina, kiel priskribi vin? Kina ne nur servas, li ankaŭ toleras min; la multaj nekompreneblaj kapricoj kaj kutimoj de la mastro pri vesto kaj manĝo estas por li senduba signo de frenezo; sed neniam eĉ unu konscia okulmovo tion perfidas. Lia maniero estas tiu de pacienca patrino, kies filo havas multajn juĝulajn fantaziojn, je kiuj li nepre resaniĝos poste kaj fariĝos saĝa kaj mensosana viro; sed dume oni devas ilin toleri kaj ne peni korekti. Tiu ĉi Buka-filo faras ĉion, kion mi diras, kaj laŭ propra iniciato eĉ pli.

Dek-sesjara, maldika, apenaŭ ne nigra, kun ruĝa brakringo sur la maldestra brako laŭ kutimo de lia hejnvilaĝo, akra, ridetema, mokema vizaĝo ofte ekŝmirita pro ornamo per ruĝa aŭ blua aŭ blanka strio, kun ruĝa aŭ flava lumbotuko kaj samkolora hibisko-petalo super la orelo en la densa nigra hararo—jen la ekstera aspekto de Kina. Priskribi unu indigenon estas priskribi ĉiujn; sed egale, priskribi unu estas montri, ke ĉiuj estas diversaj; kaj inter la brunaj Sudmaranoj ekzistas la sama senlima diverseco laŭ aspekto, menso, spirito, karaktero, kiom inter la blankaj loĝantoj de pli malvarmaj terzonoj.

Kaj Kina, same kiel ĉiu alia homo, montras la tutan gamon de sentoj, pasioj, emocioj, de la mateno, kiam li vekas min per tintanta taso da teo, ĝis la vespero, kiam li venas kun plaĉopena, iom timema rideto, dirante. — Mastro, mi volus promeni nun.

“Mi volus promeni nun”; li efektive diras nek tion, nek: “I should like to go out now.” Li parolas nek la lingvon de Zamenhof nek la lingvon de Shakespeare. Li diras, en la klasika internacia lingvo de la regiono: “Me like go limlibur now,” kio estas proksimume: “Min am’ ir’ promeni nun.” “Limlibur” estas indiĝena vorto kun signifo “promeni.” Jen, sinjoroj filologoj, specimeno de la fama “piĝin”—Angla, kiel ni parolas ĝin en Nov-Gineo, tiu kvazaŭ forgesinda filo de la Angla lingvo, tre memorinda tamen en la rilatoj kun la indiĝenoj. Krom la misiistoj, malmultaj homoj scias la indiĝenajn lingvojn, kiuj estas tre multaj kaj diversaj.

En Rabaul sin trovas indiĝenoj el ĉiuj partoj de la Teritorio, kiel ankaŭ Ĉinoj, Japanoj kaj Malajoj, kaj regus haoso sen ia komuna lingvo, eĉ sen la kruda, malgracia, tamen logika piĝino. Ne nur kun la indiĝenoj kaj Azianoj, sed inter Angloj kaj Germanoj ne sciataj la lingvon unu de la alia oni uzas ĝin, kaj eĉ inter Germanoj el malsamaj regionoj en Germanujo, kies prononcoj de la patrolingvo forte diferencas. Simpla, fleksebla, belsona, piĝino ne estas, ĝia prononco varias senfine, ĝi ankaŭ ne havas literaturon, sed ĝi estas rimedo, per kiu oni iel atingas la celon.

El la malgranda piĝinvortaro el du-tricent vortoj el la Angla, indiĝenaj, Ĉina kaj Malaja lingvoj, mi kuraĝas citi kelkajn. “Belong,” krom sia ordinara Angla senco “aparteni,” estas speco de piĝina “je” (“prepozicio, kiu difinitan sencon tute ne havas”)—sed dekoble pli maldifinita. “Fellow” estas plej precize tradukata per “umo” aŭ “uma”; oni uzas ĝin ĉiam kaj ĉie, plej ofte sen ia videbla bezono. “Two fellow cup” (du umo taso) signifas “du tasoj”; “white fellow shoe” (blanka uma ŝuo) signifas “blanka ŝuo” aŭ “blankaj ŝuoj.” Pluralojn oni esprimas ĉefe per aldono de “altogether” (entute, ĉiuj kune). La

Rabaŭlaj lernantoj de Esperanto havas memorigilon pri la pasinta tempo de la verboj en la literoj “is” de la vorto “finish” (fini): “E sing”: li, ŝi, ĝi aŭ ili kantas; “E sing finish”: li, ŝi, ĝi aŭ ili kantis. Utila kaj esprimplena vorto estas “maski”: ne grave! nenio grava! kiu solvas multajn problemojn en tropiklando. “House money true” (domo mono vera) signifas “banko”; sed “house money gammon” (domo mono trompa) estas la nomo de la Regna Trezorejo. La kolektheadon de pluaj ekzemploj mi lasas al pli entuziasmaj studentoj de ĉi tiu “Anglido,” kies konkuradon kun la Angla mi tute ne timas.

Kelkdekoj da grandverandaj “bangaloj” (tropikaj domoj) kaŝataj inter altaj aleoj de la diritaj casuarinarboj, kun izolita Ĉina kvartalo el amasigitaj domoj kaj butikoj: jen Rabaul. La stratoj estas rektangulaj, kaj ombrataj de la superpendantaj arboj, tra kiuj oni iras kvazaŭ tra tunelo, kaj ĉe la fino de unu aŭ alia iom neregula aleo oni ekvidas la havenon. Se la tago estas hela—ĉiu tago ja ne estas hela tago en Rabaul—blue brilas la akvo kaj nete kontrastas la blankajn velojn de la skunoj starantaj sur la golfo; transe de la haveno, je du kilometroj proksimume, longa linio de nealtaj, iom senesprimaj montetoj montras la malhelan verdon de sia densa arbokovro. Hela verdo en la proksimo, bluo, blanko kaj malhela verdo—jen la konsisto de la bildo.

Sed se la nuboj kronas la montojn niaflanke de la haveno, tiam la akvo estas griza. Aŭ tute glate, vitre griza, kaj la skunoj kaj la krudaj tenejoj el blankigita fero inter la palmoj ĉe la akvorando rebrilas sen perdo eĉ de detaletio en la akvo. Aŭ la vento ekpalpas ĝin dum sia paso, kaj lasas strion de senbrila akvo, kaj en la reflekteto detranĉas velon al skuno aŭ tegmenton al domo.

Aŭ suno kaj vento konspiras, kun brilo kaj eksalto, kaj la akvo ridas, kvazaŭ dancante de ĝojo.

Aŭ nigre blua nubo peze premas la montojn. Muĝas la alrapidanta pluvo, kaj la transa bordo malaperas post la ĉiam pli densiĝanta griza kurteno, la skunoj solviĝas en neniecon, kaj la akvo saltas kaj resaltas sub la skürĝo de la batanta pluvego.

Sed en pluvo aŭ brilo, sub nubo aŭ bluo, la mil kaj mil aferoj de Rabaul devas esti farataj. La graciaj skunoj iradas al kaj de la sennombraj insuloj kaj insuletoj fore sur la Pacifiko, la "grandaj" ŝipoj el la sudo alportas pli-malpli akurate kurierojn kaj komercaĵojn, kaj oni laboras en kontoro, magazeno, oficejo. La brunuloj iras tien kaj reen sur la stratoj pro propra okupo aŭ pro komisiono, kun malrapida, celkonscia paŝado de pilgrimantoj, aŭ ludas futbalon sur ĉiu malplena spaco, ĉe antaŭ la fenestroj de la granda ĉaro mem de la Teritorio Nov-Gineo, la gubernatoro, aŭ sidas sur ŝtupo aŭ vojrando babilante kaj fumante, aŭ kuŝas en senzorga dormo sur verando aŭ apud trotuaro. Policoknaboj, kies kostumo konsistas ĉefe el blanka marista ĉapo, paŝas kun la tuta digno kaj memgraveco, kiu konvenas al gardantoj de la regna sekureco. Ĉinoj, viglaj, okupoplenaj, iras de loko al loko piede aŭ biciklete aŭ aŭtomobile. Bruneta, milda, servema, ĉe timema Malajo en zorge ameliĝata vestoj—kiom li diferencas de la infana imagado de sangavida, ponardema mortigisto!—eble vendisto en magazeno aŭ skribisto en kontoro, pace iras sur la strato, laŭ kutimo salutante ĉiun renkontitan Eŭropanon.

Eksonas fajfo ĉe la glacifarejo. Dek-dua horo: Fermiĝas magazenoj kaj oficejoj, kaj ĉiuj iras por manĝo kaj siesto dum du horoj. Ĉiuj... nur ne la Ĉinoj. La grandioza, rekta aleo kondukanta al Ĉinurbo estas senfita per homoj; Ĉinoj en blankaj aŭ flavaj vestoj, indiĝenoj en lumbotukoj de blanka, verda, nigra, blua aŭ ruĝa koloroj, sed plej ofte el ruĝa, indiĝeninoj en lumbotuko kaj tro mallonga bluzo el plej helaj, krudaj, akre dissonantaj koloroj, Eŭropanoj en la universala, demokrata, blanka vestaro, kiu ne lasas distingi rangon aŭ riĉon, foje nete vestita Japanino vivece trotanta, en la nacia kostumo, tien kaj reen iras, sed ĉiam la plej laboremaj kaj laborplenaĵoj estas la Ĉinoj. En Ĉinurbo ili faras dekon da metioj, sen kiuj Rabaul estus por ni Eŭropanoj senkomforta sovaĝejo. Tage kaj nokte ne haltas la laboro; kaj ĉe post la eldiro de la ukazo deviganta fermi la butikojn je la sesa horo ĝi daŭras kun-sensaŝa diligento post fermaj pordoj kaj malfermaj fenestroj.

La plej forta varmo de la tago—tamen, neniam tiel forta, kiel la kruda varmego de la somero en kelkaj netropikaj landoj—pasas for, la suno proksimiĝas al la montetoj trans la haveno, kaj la tago rapidas al sia fino. Nubaj kasteloj kaj piramidoj, gigantaj buloj de vaporo lumas ruĝete kaj salme-ruĝe en la okcidento, la akvo de la haveno montras ruĝon inter la bluo kaj verdo, kaj la orienta ĉielo super la montetrando Namanula, kie staras la loĝejo de la gubernatoro kaj la plej bona kvartalo de Rabaul, kaj de kie oni povas ankaŭ vidi la sunleviĝon super Nov-Irlando, montras palan reflekon de la okcidenta gloro. La suna disko ektuŝas la montetojn, malaperas, kaj... nokto.

Rabaul en la nokto, se la luno ne brilas, estas dezerto de mallumo kaj konfuzaĵoj. La stellumon kaŝas la densaj arboj, kaj oni devas trapalpi al si la vojon kiel blindulo. Sed Ĉinurbo brilas de hoteloj, restoracioj por Ĉinoj kaj por Eŭropanoj, bilardejoj, kie la Malajoj amas restadi, kluboj politikaj kaj sociaj, kaj la butikoj kie la laboro ne ĉesas. Zumo de babilado venas de la kluboj kaj restoracioj; de la hoteloj venas gaja vodevila kanto, sonoj de disputado, aŭ melodia Germana horo. De la kinema eksonas rido aŭ aplaŭdo. Brunaj, malklare videblaj figuroj pasas kaj repasas en la ombro.

Mi iras hejmen por ripozi sur la verando, legi, skribi leterojn aŭ revii. Ĉirkaŭ la lampo flugas papilioj, marŝas sur la tablo aŭ ĉe sur mia libro aŭ papero. Konstante distras min iu nova speco, kiun mi ankoraŭ ne vidis: ŝajne oni neniam vidas dufoje la saman specon. La koloroj varias de densa velura nigra ĝis pala brila aluminia. Verda, ruĝa, purpura, flava, viola, perla, bruna, kaŝtana: ĉiuj eblaj koloroj estas tie, kaj ofte du-tri koloroj sur la sama insekto. Kelkaj havas sur pala fono nigran rektlinian desegnon kvazaŭ faritan de desegnisto. Jen unu iras mediteme tro proksimen al la lampo kaj falas brulvundita sur la tablon. Tuj alkuras formiketoj el nenio, kaj formanĝas la internon de la korpo, lasante nur malplenan ŝelon. Mi malfermas keston, kaj blato rampas tien kaj tien interne kaj subite forflugas. Ŝajne ĉiu insekto povas flugi, kaj kutime kaŝas tiun faktan, ĝis oni

ĝin preskaŭ kaptis kun mortiga celo. Araneoj spinas malvastan reton en kelke da minutoj; eble en la banĉambro oni ekvidas tarantulon je kvin aŭ ses coloj larĝa. La flavaj lacertoj rampas sur muroj kaj plafono, eĉ sur la tablo. Mi sentas ekpikon, kaj per malspacienca mano maltrafas ĉiam tro rapidan moskiton. La skribado kaj legado ne progresas.

Mi vokas mian knabon. Nenia respondo. Mi revokas lin. Malsankta silento. Maski! La afero povas atendi ĝis morgaŭ. Tiam mi rememoras, ke pli frue en la vespero li venis al mi: — Mastro! Mi volus iri al kinema. — Estas jaŭdo, la sola vespero, kiam oni enlasas indiĝenojn. Do mi donis al li ŝilingon kaj "pasporton" kun lia nomo en grandaj Romaj literoj, kiu permesas lin resti ekstere post la naŭa horo, kaj li foriris kontenta. . . . Ie sonas indiĝena "ĉanto": monotona, sufiĉe harmonia kantado, kun abruptaj ĉesoj kaj rekomencoj; kelkaj ĉantas en unu loko, kaj aliaj responde ĉantas en alia. Sed baldaŭ ĝin dronigas grinco de fonografo sur apuda verando: iu ludas la plej ŝirkan-tantaŭ komika kantisto. Aliaj fonografoj komencas. Baldaŭ mi povas distingi arion el "Il Trovatore," marŝon de Prusa milita orkestro, fajfan solon, sentimentalan kanton, "Kiam vi Venas al Fino de Perfekta Tago," kaj aliajn trezorojn de la popola gusto. La skribado kaj legado ne progresas.

Mi iras "limliburi" sur la ŝipstacio, kie la fonografoj ne estas aŭdeblaj, kaj nur mallaŭte florisas trans la akvo la indiĝena ĉantado. Sur la ŝipoj la indiĝenaj laboristoj kuŝas ĉirkaŭ olea lampo kaj babilas dormeme. Ie sonas la iom muzika zumo de . . . indiĝena muzikilo? Ne; de la bone konata "Juda harpo," fabrikita en Birmingham aŭ Belgujo, kaj aĉetita en Ĉinurbo.

En la nigro de la haveno rebrilas ĉiuj miriadaj lumoj de la ĉielo. Ĉiu pli granda stelo ree lumas tie sube per longa lumstrio, kvazaŭ eta cilindro lanterno pendants je duonmetro sub la surfaco. La suda kruco mem, malalta sur la horizonto, estas fidele reproduktata. Lumoj sur la bordo, domlampo en Rabaul, fajroj en la indiĝenaj vilaĝoj trans la haveno, ĵetas longajn tremantajn stilojn en la

oleeca akvo. Eĉ la palaj lumoj de neproksima Namanula reaperas en la marfundo. La du grandaj montoj staras duoblaj, monto kaj ombro. La duobla formo de la Patrino-Monto havas ardantan koron; hela fajro tie brilas. . . la forno de la glacifarejo! La luno leviĝas malantaŭ la granda monto, kaj la nigra haveno fariĝas arĝente perla. Venteto ektuŝas la akvon, kiu tuj ekbrilas per senfina serio de blankaj, helaj juveletoj. . . .

Oni revas pri la sudo—oni tiel ĉiam nomas Aŭstralion; sed la sudo estas malproksima, kaj pli facile oni memoras diversajn insuletojn en ĉi tiu regiono, kun blua maro, tondranta rifo, trankvila laguno, klara, apenaŭ videbla akvo, kaj pura sablo, ne makulita kaj malpura per la naturo, kiel Rabaul per sia apuda sulfurvulkano, kiu nigrigas la sablon kaj malklarigas la akvon, nek per la komercismo, kiel Rabaul ankaŭ per siaj Eŭropanoj kaj Azianoj. Jen granda ĝuo, marŝi sur tia bordo en la vespero, kun la murmuro de la malproksima rifo en la oreloj, la lumoj de la ĉielo en la okuloj, karesa zefiro sur la vangoj, kaj ho, kiaj pensoj en la animo! Ĝis oni ekvidas fosforan ekbrilon sub la piedoj, kaj rimarkas, ke li subite enpaŝis en la akvon, kaj vekis ĝian latentan lumon.

"And when thyself with shining
foot shalt pass"

(Kaj kiam vi en brilpieda paso), mi citas al mi Persan poeton, kiu certe ne pensis pri la Mandata Teritorio Nov-Gineo.

Dormemo fine venkas la revadon, kaj mi iras hejmen kaj grimpas en mian liton kun la granda, kvadrata moskitreto, pro kiu mi sentas humiligan similecon al peco de viando en muŝeltena ŝranko. Ekstere la luno lumas trankvile sur la herbo sub la arboj. Granda kvieto. Kiel komforta estas la lito! Kiel mola! Kiel mola kaj lula estas la mondo. Kvazaŭ vasta kusenaro. . . . Mola. . . . Lula. . . . Tre lula. . . .

— Mastro! Mastro!

A. Delsudo.

Filatelistoj!, S-ro Josef Purnr, instruisto, Hrádec Kralove II, Ĉeĥoslovakio, (ano de U.E.A. 14451), interŝanĝas poŝtmarkojn de Ĉeĥoslovakio kaj de Centra Eŭropo. Ankaŭ pogrande. Respondoj ĉiam. Faru la unuan sendaĵon.

Here and There.

The recently founded Women's International Federation, San Paulo, Brazil, has decided to use Esperanto in its foreign correspondence.

The Rev. Manoel Feitosa, Crato, Brazil, has learned Esperanto, and has promised to teach it in the local seminary.

Esperanto is permitted to be taught in the schools of Czecho-Slovakia, where the local authorities become responsible for the necessary expenditure, and where a capable teacher is available.

At Kiel there are two evening Esperanto classes conducted by the local school authorities.

The Czecho-Slovakia Touring Clubs, aggregating 21,000 members, have established an Esperanto section with the object of drawing international attention to the natural beauties of the republic.

The following Fairs, all of which seek to stimulate foreign trade, make use of Esperanto in their literature and use it in their correspondence: Bordeaux, Paris, Lyons, in France; Breslau, Frankfort, Leipzig, in Germany; Vienna, Austria; Barcelona, Spain; Helsingfors, Finland; Padua, Italy; Malmö, Sweden; Bratislava, Praha, in Czecho-Slovakia.

As a result of the international inquiry regarding the question of compulsory education, the Committee of Public Instruction, in Antwerp, has decided to introduce the teaching of Esperanto in certain schools. The inquiry referred to was made in Esperanto, and elicited 66 replies from 43 countries.

The international Labor Conference, at the instance of M. Justin Godart, chief of the French delegation, adopted a resolution in favor of using Esperanto in its correspondence.

Kroniko.

Whangarei, N.Z.—Jen tre agema grupo. Ĝi fondiĝis nur antaŭ unu jaro, sed en tiu tempo s-ro King instruis dek personojn, el kiuj unu gajnis unuan gradan diplomon. La sekretario nun instruas novan aron de komencantoj. Oficistoj por la venonta jaro estas:—Prezidanto, s-ro D. Tilly, del. U.E.A.; Grupa sekretario kaj kasisto, s-ro W. H. King; Negoca sekretario, s-ro P. Whittle; Komitato, f-ino Doris Tilly kaj s-ro J. Orme.

Melburno, V.—S-ro G. Redfern parolis pri Esperanto antaŭ la Australian Natives' Association, (Asocio de Australianoj), ĉe Brunswick, la 24an de marto. La ĉeestantoj montris grandan intereson.

Zamenhofaj Vortoj Pri Unueco.

Per unueco ni pli malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.

Ĉiu vera amiko de lingvo internacia devas absolute silenti pri siaj personaj gustoj aŭ gustetoj, kaj ni ĉiuj devas antaŭ ĉio labori en plej severa unueco, por ke ni akiru por nia afero la konfidon de la mondo.

Gvidfolio de Wiesbaden, Internacia Banurbo, havebla senpage de la tiea Urba Oficejo por Trafiko laŭ simpla mendo poŝtkarte. Tiu ĉi gvidfolio havas ses paĝojn en kiuj troviĝas ses fotografajoj kaj informo pri Wiesbaden, precipe pri ĝiaj kuracaj akvoj. Oni esperas, ke multaj samideanoj mendas ekzemplerojn, ĉar la broŝureto estas eldonita sekve de esperanta instigo.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monaĵo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Ho! Karulinet'!

Ce la monto
 Sur la ponto,
 Trans la riveret',
 Tage suno,
 Nokte luno,
 Ho, karulinet'!
 Birdoj, floroj,
 Niaj koroj,
 Kaj la flubruet',
 Oro suna,
 Perlo luna,
 Ho, karulinet'!
 Dolĉo via,
 Amo nia,
 Laŭdo le l' ondet',
 Scia fonto
 Sub la ponto,
 Ho, karulinet'!
 Ama tago,
 Nokta pago
 De la promeset',
 Ha, plenumo,
 Incensfumo,
 Ho, karulinet'!
 Kiso via,
 Ravo mia,
 Goja la plaŭdet',
 Scis ponto,
 Benis monto,
 Ho, karulinet'!
 Trans la ponto,
 Al la monto,
 Nia promenet',
 Preĝo nia,
 Fido dia,
 Ho, karulinet'!
 Ho, memoro
 Pri la horo,
 Pri la amridet',
 Pri la ponto,
 Pri la monto,
 Ho, karulinet'!
 Multaj jaroj
 De l' amfaroj,
 Vivo nur vivet',
 Dolĉa sorto,
 Sed la morto—
 Ho, karulinet'!
 Ho, espero,
 Ke la tero
 Eĉ per harĉenet'
 Min ne tiros,
 Se vi iros,
 Ho, karulinet'!

Matildo Direktilo.

Deziras korespondi nur kun Aŭstralazianoj 24 ĝis 84 jaraĵ, Angle aŭ Esperante. F-ino Mary Fowler, Glen Mervyn, Mumballup P.O., Western Australia.

Subteno Por La U.E.A.

Por konsideri kiamaniere ili povas doni monhelpon al la U.E.A. la melburnaj membroj kunvenis la 29an de marto. Proksimume tridek bonvolemuloj ĉeestis.

S-ro Ballard, la ĉef-delegito, klarigis, ke la U.E.A. suferas gravan perdon pro la rezultato de la malalta valoro de la mono de multaj Eŭropaj landoj. Li alvokis al la membroj por helpo, laŭ la letero el la Asocio.

S-ro R. Rawson parolis tre laŭde pri la helpo, kiun la U.E.A. delegitoj donis al li kaj al s-ro Pyke dum ilia ĵusa vizito al Eŭropo. Li proponis, ke oni faru monkollekton kun la helpo de la delegitoj en tuta Aŭstralazio.

Laŭ propono de s-ro Drummond la kunveno elektis s-rojn Ballard, Rawson kaj Drummond, kiel komitatato por aranĝi koncerton kaj festenon kaj por ricevi donacojn.

Oni decidis starigi monkollekton en ĉiu parto de Aŭstralazio kaj petas, ke la membroj persone postulu la helpon de ĉiu el siaj konatuloj. S-ro Ballard estas nomita kasisto. Por iniciati la kolekton la ĉeestantoj donacis dudek unu ŝilingojn.

Post la kunveno la ĉef-delegito skribis al ĉiu Aŭstralazia delegito kaj, espereble, antaŭ nun la afero jam ricevis tiel simpatian antaŭenpuŝon en aliaj lokoj, kiel ĝi ricevis en Melburno.

La Plena Aero, Libera Menso kaj Esperanto.

Lastatempe interesa ŝanĝo okazis en la oficistaro de la SKOLTA ESPERANTISTA LIGO. La eks-propaganda Fakestro, Subtrupestro K. Graham Thomson, fariĝis Eksterlanda Redaktoro de la angla monata ĵurnalo, THE TRAIL (La Vojo) kaj lin sekvis kiel Propaganda Fakestro, Subtrupestro J. W. Leslie, 527. Lea Bridge Road, Leyton, London. E. 10, Anglujo.

En la pasinteco THE TRAIL enpresigis artkolojn pri Esperanto kaj ĝia Redaktoro multe interesiĝas pri Esperanto kaj volas laŭeble ĝin subteni.

La nova Eksterlanda Redaktoro elektas en multaj landoj ekster Anglujo korespondantojn, kaj tiuj raportos al li EN ESPERANTO pri aktivecoj en siaj koncernaj landoj je geskoltado, atletiko, plenaero vivo kaj naturo-studo.

Ĉiunonate aperas en Esperanto oficialaj novaĵoj pri Esperanto. Movado kaj kvankam la plejmulto el la ĵurnalo estas presita en angla lingvo ĝi estas trege interesa al tiuj kiujn allogas la temoj suprenmitaj.

Pro tio ke la Estroj de THE TRAIL decidis subteni Esperanton oni multe esperas ke samideanoj reciproke subtenos tiun ĵurnalon. La ĵurnalo estas nur kvar anglaj ŝilingoj pagება al la Eksterlanda Redaktoro, THE TRAIL, Denison House, Vauxhall Bridge Road, London, S.W. 1.

Komercaj Ĉambroj.

La konferenco de Aŭstraliaj Komercaj Ĉambroj de Hobarto, aprobis la ideon de Internacia Komerca Ĉambro. La utileco de la Ĉambro dependos sur la facila interkompreno. Esperanto donus tiun kompreneblecon. Ĉiu samideano kiu havas rilatojn kun komercistoj devus tion multfoje montri al la membroj de komercaj ĉambroj.

La Sekretario de la Praha Specimena Foiro skribis esperante al la Melburna Komerca Ĉambro kaj ĉi lasta petis el la A.E.A. tradukon. Se multego de tiaj leteroj estos sendata el la eksterlando, la Ĉambro ne povus ne scii la valoron de Esperanto.

Gazetoj Ricevitaj.

Belga Esperantisto, nov.-dec.; Brazilia Esperantisto, sep.-dec.; Nova Eŭropo, jan.; Espero Teozofia, jan.-feb.; Espero Katolika, feb.; France-Esperanto, (51 rue de Clichy, Paris); Anstataŭas "Franca Esperantisto," N-ro, unua-jan.; Katolika Mondo, n-ro 6; Libero, feb.; L'Esperanto, jan.; La Espero, jan.; Progreso, jan.-feb.; Sennacieca Revuo, feb.; Skolo Esperantista Ligo, La Baŭtano, jan.

ESPERANTO BOOKS.

Complete stock of Esperanto Books for the first time in Australia.

This month's special parcel:

Lanaro. (Collection of the prize-winning works of the first literature competition of "La Revuo").

Tri Angloj Alilande.

Bardelli kontraŭ Pickwick.

La Litadmonoj de Sino. Kodel.

Aladin.

This collection only 5/- post free.

Send for price list to

PYKE'S BOOKSHOP,

212 Swanston Street, Melbourne.

KABE'S ESPERANTO DICTIONARY, wanted to buy. Quote price to "A.B.C.," Box 1367, Eliz.-st. P.O., Melbourne.

Kiu sendas al mi 25-100 p.m. de sia lando, ricevos same tiom da Germanajna an aliajn. Carl Kueper, str. Graf-Adolf, Dusseldorf 3, Germanujo.

Al Niaj Subtenantoj.

Dam la monato ni ricevis kelkajn respondojn de niaj abonantoj rilate ĉia peto, ke ili renovigu siajn abonojn, sed multaj ankoraŭ jam ne sendis. Ni tre dankas tiujn, kiuj faris donacojn, kiuj estis tre akceptindaj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:—E. A. Pryke, 4/6; R. Rawson, 4/6; H. Pudney, £1 2/6; G. McPhie, 5/6; G. Gordon, 4/-; F. Hennessey, 4/6; G. D. Kvarestrom, 10/-; H. Pallentyne, 3/-; S. Giles, £1; B. K. Blythe, 4/6; L. W. Saw, 10/-; W. R. Browning, 5/-; F. H. Hepworth, 2/6; P. J. Williams, 5/-; A. Douglas, 4/6.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by Fraser & Mörphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.